



# KVINPETALO (SYM) NOVAĴLETERO

Decembro 2024



## Nova jaro

Antaŭ ni estas nova jaro. **Kion ni faru ?** La sama demando estas ankaŭ antaŭ ni, SYM kaj Kvinpetalo. Post analizo de la situacio, post konstato de la tendencoj, la komitato turnas sin al alia celo, nome la konservado, diskonigo kaj utiligo de la Esperanta lingvo kaj kulturo. La celo ne estas ĉefe arkivigo, sed vivigo. Kaj tiu vivigo venos nur kun vi, esperantistoj kaj kluboj pli aŭ malpli proksimaj. Ne, la esperantistaron ne konsistigas nur maljunuloj, sed ankaŭ aliaj pli junaj. Nova jaro ankaŭ postulas novan esperon. Ĉu vi volas ke afero kiu fariĝis la celo aŭ unu el la celoj de via vivo malaperu ? Certe ne. Kaj same, la komitato ne volas ke la centro malaperu. **Nia lingvo nomiĝas Esperanto.** Ni estas esperantistoj, do ni estas esperantoj, ĉu ne ?

## Biblioteko

La katalogado de la biblioteko (libroj kaj broŝuroj) nun estas ĝisdata. Dum la jaro 2024, ĝi pliriĉiĝis. **610 libroj kaj broŝuroj aldoniĝis.** Temas ĉefe pri malnovaĵoj. Ekzemple tri versioj de la Unua Libro, 1887 kaj 1888 en la franca, pola kaj sveda lingvoj. Aŭ la kongresa libro de la unua Universala Kongreso, 1905. La revuoj estas la venonta tasko, katalogi kaj ordigi. En la estonteco tiuj katalogoj estos konsulteblaj rete. Ni esploras kiel. Same ordigenda kaj katalogenda estas la arkivo, de SYM, sed ankaŭ de Gaston Waringhien kaj Roger Bernard, kaj krome kelkaj objektoj.



## Staĝoj

La baldaŭa staĝo estas planata en marto (2-7/03/2025). **Brian Moon**, membro de la Akademio de Esperanto, atentigos vin pri kelkaj misaj uzoj de la lingvo, esprimoj kaj vortoj. Vi samtempe pliriĉigos vian vortostokon kaj korektos viajn eblajn misojn. **Esperanto estas vivanta lingvo** kiun oni nepre flegu, kaj samtempe evoluigu.

## Kluboj

Kvinpetalo estas sufiĉe **proksima de pluraj lokaj kluboj** por fariĝi renkontejoj. Ni lanĉis unuan inviton al kiu respondis esperantistoj de la departemento Deux-Sèvres. Certe estas malfacile trovi daton por tiaj interklubaj renkontiĝoj, principe dum sabato (kun ebleco tranokti). Por denove inviti, ni bezonas havi ideon pri kiu sabato en la baldaŭaj monatoj konvenos al vi. Estas ankaŭ ebleco uzi la centron **por semajnfina "seminario" de via klubo.** Kontaktu nin en tiu okazo.

## Donacoj

Post la unua alvoko, ni ricevis kelkajn donacojn. **Koran dankon al la jam donacintoj.** Esceptaj donacoj permesas al ni vivi, sed tio devas resti esceptoj. Ni bezonas regulajn donacojn ĉar la staĝoj ne sufiĉas por vivteni nin. Kiel ni jam diris 100 donacoj de 120 € devus sufiĉi por travivi unu jaron. Pli permesus plibonigi la domojn kaj la kolektojn. **Ni ne lasu la esperon fali.**

Kvinpetalo, 15 rue du Lavoir, 86410 Bouresse. <http://kvinpetalo.org>

Ĉekoj al **Société Yvonne Martinot**

Ĝiro al Société Yvonne Martinot, **IBAN** : FR91 2004 1010 0602 4086 2H02 795, BIC : PSSTFRPPLIM

Ĝiro ĉe UEA al **konto syma-l** kun indiko "Donaco de ...".

Sendu paralele retmesaĝon al [kasisto.kvinpetalo@sfr.fr](mailto:kasisto.kvinpetalo@sfr.fr).

-----  
*Respondilo por sendi poŝte (aŭ rete al [kasisto.kvinpetalo@sfr.fr](mailto:kasisto.kvinpetalo@sfr.fr))*

Nomo :

Retadreso :

Mi estas preta donaci **jare** 50€ / 120€ / 250€ / 500€ / 1000€ / .....€.

Mi ĵus sendis .....€ al via konto la (daton)..... 2024 ( ĝiro,  ĉeko,  UEA)

Mi ne povas helpi per donaco sed mi proponas alian subtenon

(bv klarigi) : .....

Mi ne povas helpi la asocion sed mi deziras daŭre ricevi novaĵleteron.

Mi deziras ne plu ricevi informojn : bonvolu eltiri mian adreson el via listo.

Sugestoj, ekzemple pri la staĝoj : .....